

Leterkesto, 2-a parto
Sudetlando
Claude Gacond, 310-a radioprelego, 1969.09.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Niaj elsendoj pri la geografia nomenklaturado interesas multajn geaŭdantojn. Tio pruvas, ke tiu temo estas aktuala. Antaŭ ol legi el longaj kaj interesaj leteroj ni rapide mencias la nomojn de la salutantoj. Tio kreas inter ni amikecan atmosferon. Ni konstatas, legante viajn poŝtkartojn kaj leterojn, karaj geaŭdantoj, ke niaj radioprelegoj estas por multaj el vi speco de internacia grup-kunveno. Hodiaŭ vi rimarkos, kiom geografie vasta estas tiu kunvenantaro.

A.- El Britio salutis sinjorino I. Zipfel, sinjoro R. A. Preston kaj gesinjoroj B. Najbaro, ĉiuj en la urbo Keighley. Tiuj lastaj rakontas, ke ili registras niajn radioprelegojn por ilin reaŭdigi en la grup-kunvenoj. Ili ŝatas la koncizan prezentadon de niaj temoj kaj senpacience atendas la eldonadon de libro, en kiu oni retrovus la tekstojn de la plej bonaj radioprelegoj de Radio-Svislando.

Cl.- Ĉiam el Britio salutis sinjoro John Brownlee en Upminster, sinjoro D. B. Gregor en Northampton, sinjoro R. G. Griffiths en Leicester, kiu estas scivolema pri la historio kaj nuna stato de la esperanto-movado en Svislando kaj sinjoro Henry D. Palmer en Bristol, kiu sin demandas, kial ni uzas la formon Svislando, anstataŭ Svisio.

A.- Estas interesa demando. Jen kiel ni respondos. En la esperanta landnoma formado Svislando troviĝas en la landkategorio, kie estas eble elekti el tri formoj. Oni povas diri Svisujo aŭ Svisio aŭ Svislando, ĉar la radiko sviso estas gentradiko. Ni preferas la formon Svislando, unue pro ĝia neŭtraleco inter la formoj Svisujo kaj Svisio, due pro ĝia eŭfonio kaj trie pro ĝia simileco al la angla formo *Switzerland*.

Cl.- Se ni rigardas la naciajn formojn ni konstatas grandan similecon inter la angla kaj esperanta formoj. En ambaŭ lingvoj la landnomo estas formata ekde la gentnomo. En esperanto **sviso** – **Svislando**, aŭ **Svisujo**, aŭ **Svisio**. en la angla **Switzer** – **Switzerland**. Kontraŭe en la germana la radiko estas la landnomo : **die Schweiz** – **Schweizer**.

A.- La formo **Svislando** ne estas komparebla kun la formoj **Nederlando**, **Islando**, **Irlando**, sed kun la formoj **Danlando**, **Finnlando**.

Cl.- El Nederlando skribis sinjoro L. H. Brans en Veghel. Koncerne la idiotismojn li opinias, ke « *monstraĵoj ekzistas en ĉiuj lingvoj, kaj ke la ĉefaĵo estas, ke ili estu komprenataj.* » En serio de elsendoj ni havos la okazon pritrakti tiun interesan kaj por esperanto aktualan temon. Ni vidos ĝis kia grado sinjoro Brans pravas.

A.- El Francio salutis sinjoro Pierre Friedlander en Suresnes, la prezidantino de la Grupo Esperantista en Béziers, kies nomon ni ne povas deĉifri, sinjoro Romain Chambaz en Etampes, sinjoro Lucien Giloteaux en Croix kaj sinjoro A. Dumarquez en Arras.

Cl.- El Svislando skribis sinjoro Henri Perriard en Chabrey, kiu sendis tradukaĵon, kiun li faris okaze de sia sepdeka naskiĝtago.

A.- El Okcidenta Germanio salutis sinjoro Bruno Gahler en Glinde, ĉiam kun la aĉa poŝtkarto, kiu diras : « *Mondo aŭskultu ! tri milionoj da Sudetgermanoj repostulas la rabitan hejmlandon.* » Ni refoje esprimas nian naŭzon por tiu blinda naciismo, kiu nur povas konduki al intergentaj konfliktoj.

Cl.- Ĉiam el Okcidenta Germanio venis poŝtkarto de la Esperanto-Grupo en Oberkirch, kiu regule aŭskultas niajn radio-prelegojn.

A.- El Orienta Germanio salutis sinjoro Ernst Mutschall en Halle, kiu ŝatas la prilingvajn temojn, kaj sinjoro Franz Tischer en Magdeburg.

Leterkesto, 2-a parto
Sudetlando
Claude Gacond, 310-a radioprelego, 1969.09.17 & 20

Cl.- El Finnlando skribis fraŭlino Olga Ihander kaj sinjoro Harri Laine en Nupuri, kiu opinias, ke « *pli dolĉa travivaĵo ne ekzistas, ol iri rekte el saŭno je 100 gradoj en lagon je 15-20 gradoj Celsius.* »

A.- Fine el Ĉeĥoslovakio salutis sinjoro František Pytloun en Podebrady, kiu transdonas la salutojn de la loka Esperanto-Klubo, sinjoro Josef Fousek en Prelouc, kiu ĉeestis en 1913 la Universalan Kongreson en Bern kaj fine sinjoro Jiri Patera en Most, kiu sendis al ni du tre interesajn leterojn, el kiuj ni ĉerpas kelkajn erojn.

Cl.- « *Mi tre dankas pro la bona kaj justa respondo al sinjoro Bruno Gahler, kiu laboras por sudet-germanoj. Mia loĝurbo Most, germane Brüx, situas ĝuste en la teritorio nomata Sudetoj. La urbo estis ĉiam duongermana kaj duonĉeĥa, eble la germana elemento estis iom pli forta ol la ĉeĥa. Se mi legas historion de la urbo, mi povas facile konstati, ke ambaŭ nacioj ĉiam laboris kune por la bono de la urbo, sed neniam, aŭ preskaŭ neniam okazadis gravaj malpaciĝoj inter la gentoj. Kiam la urbo plurfoje forbrulis dum la mezepoko, tiam suferis kune la loĝantoj de ambaŭ nacioj. Se okazis iuj konstruadoj, pavimado de stratoj, konstruo de akvokondukilo, konstruado de la granda preĝejo, kiun nun oni intencas translokigi, tiam kontribuis per laboro kaj mono kune ĉeĥoj kaj germanoj. La urbestroj estis iam ĉeĥoj, iam germanoj. La urbanoj batalis kune kontraŭ husanoj. Most estis katolika urbo, kaj kontraŭ svedoj. En la tombejo staras unu apud aliaj monumentoj kun ĉeĥaj kaj germanaj surskriboj.*

A.- *Mi ne povas analizi pli detale ĉiujn problemojn ligitajn al la kunvivado de ambaŭ nacioj, daŭrigas nia ĉeĥa aŭdanto Jiri Patera, pri la historio de ilia kunlaborado kaj pri bataloj de ĉeĥoj por sia defendo, pri la dua mondmilio kaj pri la ellandigo de germanoj el nia lando. Certe estas multe da amaro ambaŭflanke, sed tiom oni ne povas forigi per novaj maljustaĵoj. Ĉeĥoslovakio suferis multon eĉ nur dum kelkaj lastaj jardekoj kelkajn okupaciojn, liberigojn kaj « liberigojn », kaj tiel plu. Ni tute ne deziras pliajn militojn aŭ malamikajn kunpuŝigojn kun aliaj landoj. Kompreneble, ĉiu popolo klarigas sian historion laŭ siaj intereso kaj plaĉo, do unu egala afero povas esti klarigata el malsamaj vidpunktoj kaj kun malsamaj rezultoj, ĉiam favoraj por unu kaj malfavoraj por la alia flanko. Sed tie ne troviĝas la ĝusta vojo. »*

Cl.- Nia ĉeĥa amiko Patera tiam konkludas : « *La sola ebleco por forigi ĉiujn maljustaĵojn de la pasinteco estas forigi la limojn inter unuopaj landoj, ebligi al la homoj loĝi kaj labori tie, kie plaĉas al ili, kaj tiel plu. Se ni foliumas la historian atlason, ni vidas kiel multe ŝanĝiĝis la mapo de Eŭropo dum la jarcentoj, sed la popoloj vivis ĉiam sur la samaj lokoj. La politika divido estis nur porokaza ĥimero, kiu poste aliformiĝis por denove ŝanĝi la formon. Nur la popoloj ne ŝanĝis siajn loĝlokojn. El tio videblas, ke la politikaj landlimoj estas nenaturaj, artefaritaj kaj sekve forigendaj. Ni homoj, kaj precipe esperantistoj, devas labori ne por ŝanĝo de tiuj limoj, sed por ilia kompleta forigo. Sed – kompreneble – tio nun ankoraŭ ŝajnas utopio, kvankam mi estas certa, ke ankaŭ tiu ĉi utopio efektiviĝos. »*

A.- Vi aŭdis babiladon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !